

2631 S-ro Yasuo Tabuchi, Japanio
 2632 S-ro Timothy Potié, Francio
 2633 S-ro Bernard Biggonet, Francio
 2634 S-ino Taki Midori, Japanio
 2635 S-ro Jean-Lucien Mazeau, Francio
 2636 S-ro Eric Nemes, Belgio
 2637 S-ino Aleksandra Gabriilo, Kroatio
 2638 S-ro Benedicto Silva, Brazilo
 2639 S-ino Dulce Mara Silva, Brazilo
 2640 S-ino Irene Caligaris, Italio
 2641 S-ro Franco Vaio, Italio
 2642 S-ino Julia Samsonova, Rusio
 2643 S-ro Zharo Haonan, Ĉinio
 2644 S-ino Marie-Thérèse Guillaume, Francio
 2645 S-ro Luiz Fernando Puhl, Brazilo
 2646 S-ino Laurence Ducret Aidonidis, Svisio
 2647 S-ino Léna Plantier, Francio
 2648 S-ino Mila Plantier, Francio
 2649 S-ino Julie Plantier, Francio
 2650 S-ro Léo Plantier, Francio
 2651 S-ro Josep Altadill, Hispanio
 2652 S-ino Araksja Elbakjan, Armenio
 2653 S-ino Lida Elbakjan, Armenio
 2654 S-ro Ilja Muravjov, Rusio

Mardo – 28.07.2015

17h30 – Kroma aŭtoro duonhoro: György Nanovszki – “Nano – Aventuroj de poliglota diplomato”.

Ĵaŭdo – 30.07.2015

10h00 – Marjorie Boulton – “Vid-al-vide kun nia plej elstara Esperanto-poetino”. Konversacio kun la aŭtorino.

11h00 – Stano Marček – “Esperanto per rekta metodo” en 36 lingvoj, didaktikaj materialoj, sonlibroj.

12h00 – Katalin Kováts – “Novaj lernomaterialoj”.

14h00 – Kalle Kniivilä – „Miaj du novaj libroj”.

15h00 – Nicola Ruggiero – Mia ĵusa poemaro „La kanto de l’ korvo”

16h00 – Peter Baláz: „Nova eldono de KAEST-prelegaro 2014 pri Arkivoj kaj Bibliotekoj”

17h00 – Amri Wandel – mia ĵus aperinta E-traduko de la rakonto “Esperanto”, parto de unu el la lastaj libroj de la fama israela verkisto Amos Oz. Amri rakontos ankaŭ pri siaj renkontiĝoj kun Oz kaj pri la speciala rilato de Oz al Esperanto.



Belfrido

Mardo, 28 julio 2015

N-ro 3

La 100-a UK tutmonde inaŭgurita

La Inaŭguro de la 100-a UK estis ne nur solena sed eĉ tutmonda, ĉar unuafoje en la UK-historio ĝi estis samtempe sekvebla per reta elsendo.

Antaŭ ol d-ro Mark Fettes bonvenigis la ĉeestantojn, la publiko bonvenigis per longa aplaŭdo d-ron L.C. Zaleski-Zamenhof, kiam li eniris la salonon. Ĉeestis ankaŭ la Alta Protektanto s-ro Frédéric Cuvillier, eksministro kaj urbestro de Bulonjo-ĉe-Mar. En sia parolado li invitis la kongresanojn viziti la UK-lulilon en la ekskursita tago, kaj ĝojigis ilin ankaŭ per la plano starigi Esperanto-centron tie.

Xavier Dewidehem bonvenigis la kongresanojn kiel la prezidanto de LKK. Li raportis pri la granda laboro de la organizantoj por plenumi la promeson pri abunda programo kaj pri malfermo de la UK al la ekstera publiko, kiun li faris en Bonaero, kiam li transprenis la kongresan flagon.

Per emociaj salutvortoj la 90-jara d-ro L.C. Zaleski-Zamenhof fermis “karieron”, kiun li komencis kiel 9-jarulo en la Stokholma UK en 1934, kie li jam salutis la kongreson nome de la familio Zamenhof. Ekde nun la tradicion daŭrigos liaj filinoj Hanna kaj Margareta, kiu jam parolis en la Lilla inaŭguro post sia patro, legante ankaŭ mesaĝon de sia fratino. ▶

**MENDU LIBROJN,
 KIUJ JAM MANKAS EN LA LIBROSERVO**

Ĉu vi volis aĉeti libron, sed ĝi ne plu estas havebla en la kongresa libroservo? Ne seniluziiĝu, neni problema! Se la libro (aŭ alia varo) estas havebla en la Centra Oficejo de UEA, vi povas mendi ĝin kaj ricevi ankoraŭ en la kongreso!

Bv. plenigi la flavan mendilon de la libroservo kaj redoni ĝin hodiaŭ ĝis 18h00. Viaj libroj estos transportitaj al Lillo dum la ekskursita tago kaj vi povos preni ilin ekde ĵaŭdo. Vi povas mendi iun ajn titolon el la katalogo ĉe <http://katalogo.uea.org>.


SALUTMESAĜO DE LA VERKISTO AMOS OZ

Pli ol duonjaron Amri Wandel korespondas kun Amos Oz, verŝajne la plej elstara kaj internacie konata verkisto de Israelo, pro traduko en Esperanton de lia novelo “Esperanto”. Antaŭ unu monato ELI eldonis ĝin, kaj Amri renkontiĝis kun Oz por transdoni al li kelkajn ekzemplerojn. Ili interparolis pri Esperanto, kaj Amri rakontis pri la jubilea Kongreso en Lillo. Oz interesiĝis, scivolis pri la programo kaj pri la prezentado de novaj libroj kaj Esperanto-literaturo. Li sendis la ĉi-suban salutmesaĝon por la Kongreso, kiun Amri tradukis laŭvorte:

“Kara Amri, Bonvolu transdoni mianome varman saluton al ĉiuj partoprenantoj de la Kongreso, kaj diru al ili, ke Marteno Vandenberg (“la esperantista heroo de la novelo *Esperanto*”) esprimas ankaŭ miajn sentojn por la lingvo Esperanto kaj por ĝiaj fundaj ideoj.

Kun estimo kaj danko”,

Amos Oz



SALUTPAROLADO DE D-RO INĜ. LOUIS ZALESKI-ZAMENHOF

**Sinjoro Prezidanto,
 estimataj Honoraj Gastoj,
 karaj geamikoj alvenintaj al Lillo el diversaj partoj de nia terglobo...**



“En la nomo de la familio ZAMENHOF mi salutas la Kongreson...”
 Tiujn samajn vortojn mi, tiam naŭjara knabeto, adresis en la jaro 1934 al la Dudeksesa Esperanto-Kongreso en Stokholmo. Hodiaŭ, naŭdekjarulo, mi ilin ripetas, salutante la Centan, la Jubilean, ĉi tie en Lillo.

Cent dek jaroj pasis ekde la Unua, okazinta najbare, en Bulonjo-ĉe-Mar. Cent dek jaroj kaj cent Universalaj Kongresoj, festoj ĉiujaraj escepte de la dek jaroj de “grandaj” militoj. Ĉar nia lingvo, niaj ideoj estas nature ligitaj al la paco, ni ja estas “pacaj batalantoj”, kiuj “promesas sanktan harmonion al la mond’ eterne militanta”.

Fakte, neniam ankoraŭ Eŭropo ĝuis same longedaŭran pacon. Hodiaŭ, la sepdekjaraj junuloj de tiu ĉi kontinento konas la militojn nur de rakontoj aŭ de libroj, beletraj aŭ historiaj. Tial povas fruktodone evolui la *dialogo inter kulturoj pri lingvoj kaj artoj*, la temo de la hodiaŭa kongreso. Kongreso, kiu por mi, la “Nepo”, tamen maljunulo, eble estos la lasta kiun mi partoprenos. Tial, la taskon kaj honoron reprezenti tiuokaze la Zamenhofan familion mi transdonas al miaj filinoj, do la “Pranepinoj”. Ili ambaŭ, kvankam edziniĝintaj, konservis la familian nomon. La pli aĝa, Hanna ZARUSKI-ZAMENHOF, loĝanta en Filadelfio, postvenos min en la okcidenta terglobo, dum la pli juna, kiun mi havas la plezuron prezenti al vi ĉi tie, faros tion oriente de Atlantiko.

Jen ŝi, doktorino Margareta ZALESKI-ZAMENHOF! Ŝi deziras adresi al vi kelkajn salutvortojn.

(Poste d-rino Margareta Zaleski-Zamenhof salutis la Kongreson, leginte unue la salutvortojn de sia fratino Hanna Zaruski-Zamenhof.)

La UEA-estraranoj Martin Schäffer kaj Stefano Keller legis kelkajn salutmesaĝojn de diverslandaj eminentuloj, i.a. de la vicprezidantino de la Eŭropa Parlamento, mag. Ulrike Lunacek, kaj de la federacia prezidento de Aŭstrio, d-ro Heinz Fischer, kies gepatroj estis esperantistoj kaj kiu mem estis la Alta Protektanto de la Viena UK en 1992. (Pliaj mesaĝoj aperos en *Belfrido*.)

Stefan MacGill, vicprezidanto de UEA, anoncis la elekton de la fama itala juristo Giuliano Turone kiel membro de la Honora Patrona Komitato de UEA. Poste la estrarano Barbara Pietrzak prezentis la novajn Honorajn Membrojn de UEA, la francan verkiston-eldoniston André Cherpillod kaj la germanan historiiston kaj eksestraranon de UEA Ulrich Lins.

La Zamenhofa voĉo iris kiel ruĝa fadeno tra la festparolado de la prezidanto de UEA, kiu multe citis el la historia parolado de Zamenhof en la unua UK, montrante ĝiajn profetecon kaj aktualecon ankaŭ 110 jarojn poste. Li haltis ankaŭ ĉe la jubileo de la 60-jariĝo de la Montevidea rezolucio de Unesko pri Esperanto, heroe perbatalita de Ivo Lapenna, kaj donis pensigajn impulsojn al la traktado de la kongresa temo. (La prolado aperos en la sekva numero de *Belfrido*.)

Sekvis la salutvortoj de TEJO fare de la vicprezidanto Michael Boris Mandirola, de ILEI fare de la prezidanto Mirejo Grosjean, de la Akademio de Esperanto fare de la prezidanto Christer Kiselman kaj de SAT fare de Nicolas Raymond.

Sekvis la kavalkado de landaj salutoj, reĝisorita de la estraranoj José Antonio Vergara kaj Lee Jungkee. La rekorda nombro de pli ol 70 landoj donis impresan bildon pri la tutmondaj dimensioj, al kiuj kreskis la afero, komencita en Bulonjo-ĉe-Mar. En la inaŭguro en 1905 ne necesis nek ekzistis laŭparoliloj; en Lillo necesis tri salonoj kaj video-ekranoj por ĉeestigi ĉiujn. Kaj Interreto por la cetera mondo.

Post komuna kantado de la Himno, la prezidanto Fettes deklaris la kongreson malfermita per la martelo, donacita al UEA de LKK de la UK en Malmö en 1948.

Osmo Buller, KN 62

La tuta inaŭguro estas spektebla ĉe
<http://www.youtube.com/watch?v=frgspNkHnVo>

Komitato kvoruma kaj konstrua

Sabate kunsidis en la salono *Hodler* la komitato de UEA, kvoruma, kun 45 komitatanoj. Post rutinaĵoj ili trastudis la resumon pri la faritaj laboroj tra la lasta jaro. Reage al interveno, promesita estis baldaŭa testa reta voĉdono de la Komitato, kies teknikaj kaj regularaj aspektoj estas en ordo. Venis laŭdoj pri la AMO-programo, kaj deklaro, ke Brazilo volas ĉiujare okazigi tian seminarion, kune kun deziro de pli adekvata aperigo



Fotis: Marija Belošević

de rezultoj, i.a. per filmado. Komisiono pri Kongresa Rezolucio estis starigita: Fettes, Keller, Schwarzer, Usui, Viana. Dumkongresa komisiono pri nova Regularo de TEJO konsistas el Mandirola (gvidanto), Buller, Schaeffer, Moon, Poór, Maia Jr., Corsetti, Schröder, Maurelli kaj Demmendaal. Traktota estas petita regularo pri konflikto-solvado. Estis nomumitaj nova membro de la Honora Patrona Komitato, kaj du Honoraj Membroj, anoncitaj en la Inaŭguro, pri kio ni jam raportis.

Sekvis diskutoj pri la Jarraporto de la Estraro pri la jaro 2014. Pri *Konsciigo* Corsetti pledis kiel delonge por pli aktiva atento al informado; la rolo de CED en informaj kampanjoj fortiĝu. Maurelli resumis la konsiderindajn atingojn de TEJO. Kadre de *Kapabligo* Maurelli informis pri trejnadoj ĉe TEJO kun subvencijaj subtenoj. Keefe agnoskis la rolon de instruista trejnado, sed pledis, ke ni traktu pli zorge la memlernantojn. Gobbo klarigis pri la universitata laboro en Amsterdamo. Rilate *Kunordigon* oni raportis kreskon membran de 6% por 2015. Raola atentigis, ke la Konsilio, kvankam bona ideo, nesufiĉe aktivis. MacGill agnoskas la estraran devon proponi al konsilianoj pli konkretajn taskojn kaj projektojn; tio lastatempe okazis. Wandel dankis pro la retkunsidoj. Witdoekt proponis, ke multjaraj Dumvivaj Membroj plie kontribuu al la asociaj financoj. S tefan MacGill, KN 56

(Laŭ EKO n-ro 1)

Asocio de Verduloj Esperantistaj

AVE invitas al la malferma kunsido marde 28 jul 14h30-16h00 en la salono *Cart*. Ni estas simpatiantoj kaj membroj de Verdaj Partioj, kaj instigas ilin uzi ankaŭ Esperanton. Ni jam tradukis gravajn dokumentojn kaj subtenas projektojn en Tanzanio kaj DR Kongo. Ĉi lasta aktuale temas pri la 3-a projekto "Akvo por Kalima". Ni prezentos fotojn de la finita 2-a projekto*. Ni instigas UEA al daŭripova agado. Informoj troveblas ĉe www.verduloj.org.

D-ro Manfred Westermayer, KN 1924

* Okaze de la kunveno estos prezentita ankaŭ la projekto "Kampara Solidareco" en DR Kongo.

Betty Chatterjee, KN 228

Ĉu vi estas membro de ATEO?

La administra kunsido de Ateista Tutmonda Esperanto-Organizo okazos mardon 11h00-11h45 en la salono *Paŭli*. Ĉiuj membroj de ATEO estas invitataj por doni opiniojn kaj ideojn pri la agado de ATEO. Eblos membriĝi ankaŭ surloke. La publika kunveno okazos jaŭdon, kun la titolo "Ateistoj kaj la rajto je libera esprimiĝo".

Anna Löwenstein KN 1948

Eŭropa Esperanto-Unio

Jara kunveno de la Asembleo de EEU okazos jaŭde 30 jul 2015, 13h30 en la salono *Paŭli* (*Hainaot*). Kunvenos elektitaj asembleanoj aŭ anstataŭantoj, kiuj reprezentas landajn asociojn de EU-landoj. Oni traktos raportojn pri la agado de EEU en 2014-2015. La kunvenon prezidos la prezidanto de EEU d-ro Séan Ó Riain.

Zlatko Tišljar, KN 492

Memortabulo pri Waringhien

Kongresanoj estos bonvenaj ĉeesti la inaŭguron de memortabulo ĉe la naskiĝdomo de Gaston Waringhien en mardo je 11h00-12h00 ĉe 8 place Philippe-Lebon.

Granda peto

nome de la asembleanoj Junaj Voĉoj

Post sukcesa prezentado de la unua folkloro parto de "Freŝiga Vento el Montaro" kelkaj eksterlandanoj ekinteresiĝis pri la eblo inviti ilin por koncerti en iliaj landoj, sed petis doni al ili filmitan fragmenton de la prezentado. Se iu filmis dum la prezento, bv. kontakti halinakomar@gmail.com, tel. +48 604 088 620



Filmfestivalo: Koloroj de la mondo

Ĵaŭde la 30an de julio de la 16a ĝis la 20a en la junulargastejo (*Auberge de Jeunesse, 12 rue Malpart*).

Unua parto:

Malfermo per muziko de Sepa kaj Asorti Teo kaj Amo, 20 filmetoj premiitaj en la konkurso, prezentataj de Ĝoĵa <http://esperanto.cri.cn/other/15yq.html>

Dua parto:

Roman Dobrzyński prezentos siajn plej novajn filmojn, i.a.

Bonvenon al Nepalo
Bona Espero, nia tero

– kaj premiere tute novajn filmojn pri aliaj partoj de la mondo.

Enketo en lernejoj

En la halo Michaux, sur la tablo antaŭ la muro, troviĝas kajero kun enketo. La demando estas: "Ĉu en via lando oni instruas religion, filozofion, moralon, person-evoluon aŭ civitanecon? Kiom da horoj en semajno – en bazaj lernejoj (7 ĝis 12 jaroj)?" Dankon pro la partopreno! Hugo Durinck, KN 1145

Saluto de la Ambasado de Kroatio en Francio

Estimataj partoprenantoj de la kongreso, gesinjoroj, karaj geamikoj,

Mi estas feliĉa kaj estas honoro por mi povi adresi al vi miajn salutvortojn pro tri kialoj:

Grava evento okazas en Francio, la lando kie mi estas ambasadoro, la lando kiu en 1905 en Boulogne-sur-Mer estis gastiganto de la unua Universala Kongreso de Esperanto.

Mi venas el malgranda eŭropa lando, el Kroatio, en kiu dum jarcento grave sentebliis la ĉeesto de aliaj lingvoj, la latina, la germana, la itala, la franca, ĝis la angla hodiaŭ. Sed en Kroatio antaŭ cent jaroj, same kiel en aliaj landoj, komencis evolui la Esperanto-Movado. La kroataj esperantistoj donis grandan kontribuon al la disvastiĝo de Esperanto.

Mia avo Ivo Goldstein, portinto de la sama nomo kiel mi, estis antaŭ la Dua mondmilito sekretario de Esperanto-Societo en Karlovac, urbo 40 km sude de la ĉefurbo Zagreb. Mia avo estis vera enamiĝinto al Esperanto, li krome parolis tutan aron da lingvoj, li estis vera poligloto, krome li verkis rakontojn kaj poemojn. Krom tio, oni povas diri, li ankaŭ estis revulo. Li revis pri pli bona mondo, kiun li ne ĝisvivis.

Mi deziras al la mondo amikecon, kunlaboron, solidarecon kaj pacon, en multe pli granda kvanto ol da ili oni havis ĝis nun. Kaj al via kongreso sukcesan laboron.

Ivo Glodstein

